

la
verda
stelo

ESPERANTO
NEDERLAND



SEKCIO
ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

marto 2017



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO
por la provincoj
GRONINGEN, DRENTE kaj FRIESLAND

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72
retadreso:
johan.swenker@xs4all.nl

sekretario

s-ino N. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 60
9728 VV Groningen
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro R. Hofman
Castorstraat 360
9742 BZ Groningen
tel. +310642247155
retadreso: esperanto@ziggo.nl

KONTAKTPERSONO FRISLANDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan jaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker, I. Emmelkamp
retpoŝto:
la.verda.stelo@xs4all.nl



Enhavo

Klubkunvenoj	3
Naskiĝtagoj	4
Jarkunveno	5
Peto de la kasisto	5
Filozofiumado (30-an de marto)	5
Komuna manĝo	5
Pri la nordo	6

Contributie Esperanto Noord-Nederland

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op ING banknr IBAN: NL50 INGB 0003 8224 72 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Groningen	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **ESPERANTO NEDERLAND**.

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

IBAN: NL10 TRIO 0786 8441 67 t.n.v. **ESPERANTO NEDERLAND** te
Capelle aan den IJssel

Lidmaatschap (incl. abonnement Fenikso)	€ 30,00
Gezinslid	€ 10,00

Klubkunvenoj

marto

- 2 Distra parolado
- 16 Jarkunveno
- 30 Prezento far Korine Cheizoo

aprilo

- 13 Distra parolado

majo

- 11 Komuna manĝo ĉe *Spices* (Westersingel 23) ekde **18:30**

someraj renkontiĝoj

- 8 junio Prinsentuin, se eblas Theeschenkerij
Ĉe malbona vetero: Grand Café ekde **10.30**
- 6 julio Schimmelpenninck Huys ekde **10.00**
- 3 aŭgusto Scandinavisch Dorp ekde **10.30**

septembro

- 14 Niaj someraj okazaĵoj
- 28 Distra parolado

oktobro

- 12 Malferma vespero
- 26 Distra parolado

novembro

- 9 Distra parolado
- 23 Distra parolado

decembro

- 7 Distra parolado
- 21 Zamenhofa vespero ekde **18:30**

januaro 2018

- 4 Distra parolado
- 18 Distra parolado

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia
retejo sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

Naskiĝtagoj

4 januaro	Wil	Van Ganswijk-Vlasblom
17 januaro	Ab	Ploeg
27 januaro	Ineke	Emmelkamp
8 februaro	Andries	Hovinga
11 februaro	Henk	Van Kappen
28 februaro	Luit	Staghouwer
24 marto	Bert	Begeman
1 aprilo	Tiny	Bulk-Beenen
6 aprilo	Petra	Van Kappen-van de Kamp
7 aprilo	Ankie	Van der Meer
5 majo	Gonda	Kruijer
7 majo	Gerard	Boer
23 majo	Frans	Schild
27 majo	Warner	Renken
1 junio	Adri	Oosterwijk-Dominicus
24 junio	S-ro	Snoek
10 aŭgusto	Nelly	Kiel
16 aŭgusto	Koos	Scharroo
27 aŭgusto	Hielke	Bron
30 aŭgusto	Johan	Swenker
3 septembro	Wiebren	Akkerman
5 septembro	Berendina	Brink
6 septembro	Anna	Bijl
7 septembro	Marita	Kruijswijk
17 septembro	Henny	van Hogen-Cornelissen
24 septembro	Els	van der Heij-Alblas
2 oktobro	Fien	Koopmans-Hollenga
29 oktobro	Bets	Dodebier
14 novembro	Greta	Volders
1 decembro	Richard	Hofman



Jarkunveno

16 marto 2017

La jarkunveno de nia klubo ofte similas kutiman klubvesperon. Sed ĉi-jare ni havas problemon. Jam dum la pasinta jarkunveno la sekretariino Nelly Kiel diris, ke 2016 estos la lasta jaro en kiu ŝi estos estrarano. Kaj ankaŭ la prezidanto Johan Swenker anoncis, ke li demisios.

Du novaj estraranoj do estas bezonataj.

Ni do bezonas vin en la jarkunveno kiel novan estraranon!

Peto de la kasisto

Kontribuo

La printempo de 2017 alproksimiĝas kaj ankoraŭ ne ĉiuj membroj pagis sian kotizon. Kelkaj el vi eĉ ne pagis la kotizon por 2016 aŭ antaŭ pli longe. Volonte mi ricevas de vi antaŭ la fino de marto ĉiun nepagitan kotizon en nia konto NL50 INGB 0003 8224 27 de Esperanto Noord-Nederland. Membroj pagas € 12,50 por jaro kaj samhejmanoj € 6,25. Ĉu vi ne plu certas, ke vi

pagis lasta(j)n jaro(j)n? Sendu retmesaĝon al esperanto@ziggo.nl kaj mi esploros tion por vi.

La kasisto

30 marto

La 30-an de marto Korine Cheizoo venos al nia klubo. Ĉi-sube ŝi mem eksplikos kion ŝi prezentos al ni.

Filozofi-umado estas vorto, kiun elpensis Korine Cheizoo por indiki, ke temas pri interbabila laborgrupeto por ĉiuj, de ĉiuj aĝoj, devenoj, edukado k.s. Temas ne pri tre serioza okupo de filozofoj. La partoprenantoj parolas pri aforismoj kaj spritaj eldiraĵoj de famuloj kaj malpli konataj homoj. Tiuj aforismoj kaj eldiraĵoj troviĝas sur kartoj kun demandoj por stimuli la diskutadon.

Korine gvidas la interparolojn inter la partoprenantoj.

Labormaniero: partoprenanto elektas diskutkarton, laŭtleĝas, respondas aŭ sciigas pripensojn. Poste aliaj reagos ktp.

La celo estas interŝanĝi opiniojn kaj pripensojn, kaj tiel leĝere filozofi, filozofiece interbabili pri certaj temoj el de propraj spertoj kaj pensoj, rilate al la vivo ĝenerale, vivkonceptoj, praktika kaj spirita konvinkoj k.s.

11 majo komuna manĝo

Dum la kunveno de la 2-a de februaro, ni decidis, ke ĉi-jare la fina kunveno de la sezono estos en restoracio *Spices*, Westersingel 23 en la urbo Groningen.

Ili atendos nin je la sesa kaj duono.

Anoncu vin kiel eble plej baldaŭ ĉe Johan.

Filozofi-umado

Pri la Nordo

8 septembro

Kiel en ĉiu jaro la sezono komenciĝis per interbabila vespero sub la temo *niaj someraj okazaĵoj*.

22 septembro

Andries kunportis la nederlandlingvan libron de la *Zagreba Metodo*. La Zagreba Metodo estas maniero instrui Esperanton. Male ol aliaj instrumetodoj, ĝi estas bazita ne sur la sama fundamento, kion oni

uzas por instrui aliajn fremdajn lingvojn, sed sur la strukturo de Esperanto mem. Ni iomete parolis pri la Zagreba Metodo.

Ineke kaj Andries ĉeestis la BeNeLuksan kongreson en Lier. Ĉeestis personoj el diversaj eŭropaj landoj, kiel Germanio kaj Danio, sed tute ne ĉeestis esperantisto luksemburga. Ili tamen ekzistas! En la retpaĝo de *Luksemburga Esperanto-*

Asocio vi trovas anoncon pri la libro *Esperanto, la rekta metodo* de Stano Marček. Tiu libro estas havebla en la leceburga!




La 20-an de oktobro okazos malferman vespero, sed kiel varbi gastojn? Dum la jarkunveno ni parolis pri anonco en gazeto. Ĉi-vespere ni decidis kaj parolis pri la enhavo de la anonco: *Ontdek 't Esperanto, een internationale taal voor iedereen, met gratis koffie, thee en*

proefles, kaj aldone dato kaj loko. Ankaŭ faldfolioj ni pridiskutis: la sama teksto kaj kiel dekoracio bildo de la legosigno ambaŭflanke de la teksto.



Ontdek 't Esperanto

met gratis koffie, thee en proefles pingveno.nl/klubo esperanto@swenker.org
20 oktober 2016, 19:45 Dreesflat W.Dreesstraat 1 Groningen



Pri la distribuado ni jam scias, ke Nelly povas meti ilin en Willem Lodewijk-gimnazon, kie ŝi volontulas en la biblioteko.

La pasintan fojon Wil kunportis multajn pomojn de najbara pomarbo. Andries prenis kelkajn hejmen, kaj lia edzino faris el ili pomkukon. Ankaŭ Richard prenis kelkajn hejmen kaj faris el ili pomsukon. Li kunportis la pomsukon al la kunveno, tiel ke ni ĉiuj povis havi glason da suko. Ni ĉiuj konsentis: la memfarita pomsuko gustas bonege!

6 oktobro

Unue ni denove parolis pri la anonco kaj la faldfolio, per kiuj ni klopodas atentigi la publikon pri la venonta malferma vespero. La faldfolioj troveblas en bibliotekoj kaj memservejoj en Groningen kaj Leeuwarden. Grava demando estas 'Kion ni prezentos al eventualaj interesatoj?' Johan montros parton el la prezentado *Esperanto kiel vivanta lingvo* de Federico Gobbo dum la Drongo-Festivalo en la Jaarbeurs en Utreĥto, kiu okazis vendredon la 30-an de septembro

kaj sabaton la 1-an de oktobro 2016. Wiebren disponigos ciferecan projekciilon kaj ekranon (per cifereca projekciilo oni povas montri komputil- aŭ bitigitajn film-bildojn). Ineke montros kaj parolos pri la broŝuro *Ontdek het Esperanto*.

Ĉi-foje neniuj el nia klubo vizitis la kunvenon *Netwerken*, en kiu oni parolis pri ebloj por aktivaj maljunuloj.

Wil denove kunportis sakon kun pomoj. La plimulton volonte akceptis Richard.



Ineke ricevis mesaĝon de iu, kiu kolektas librojn de *W.G. van de Hulst*. Tiu volonte aldonos al sia kolekto la libron *Jaĉjo Holm kaj liaj amikoj*. Nova ekzemplero ne plu estas havebla, sed la Libroservo de UEA havas ankoraŭ brokantan ekzempleron.

20 oktobro

La 20-an de oktobro okazis nian malferman vesperon. Kiel ĉiam ni anoncis ĝin en la gazetaro per presanoncoj. Sed alie ol kutime, ĉi-jare ni decidis pagi por anonco en *Dagblad van het Noorden*. La anonco aperis en bela loko: meze, je la dekstra flanko de la paĝo.



Ni preparis ankaŭ faldfoliojn. Ĝi estis pendigita sur la anonctabulojn de multaj superbazaroj en Groningen. Sed ĉiuj niaj penoj ne helpis. Venis nur personoj, kiuj jam estas membro de nia klubo.

Tamen la vespero tamen interesa. Ni interalie rigardis la prezentadon de Federico Gobbo kaj parolis pri la enhavo.

3 novembro

La 3-an de novembro ni parolis pri ĉio ajn. Ni ekzemple ricevis inviton de klubo *Alkmaar* ĉeesti ĝian 65-jaran jubileon. Programero estos la malfermo far la skabeno, sed ni demandis: kiu malfermos kion? Sekvis interesa diskuto pri gramatiko.

Kelkajn tagojn antaŭe, pri la centra entreprenkonsilio (nederlande: *COR*) de la polico legeblis en ĉiu nederlanda gazeto. Ili malŝparis monon en luksa hotelo, kun ĉampano ktp. Ineke laboris ĉe la polico, kaj ni ĉiuj pensis: verŝajne ni faras ion ne bone, ĉar ni tranoktas ne en tiaj hoteloj.

La *IISG* (Internacia Instituto de Socia Historio) kolektas arkivojn de societoj. Do Ineke nun devas krei la arkivon de Esperanto Nederland. Kelkaj dokumentoj estas haveblaj surpapere, sed la plimulto ekzistas nur en elektronikaj sistemoj. Kiam Ineke komencis kiel sekretario de

Esperanto Nederland, ŝi printis preskaŭ ĉion, eĉ la plej simplajn petojn pri informo. Nuntempe ŝi konservas nur la vere gravajn dosierojn, ekzemple la dokumentojn pri la monumento de Texel kaj pri la katedro de Federico ĉe la Amsterdama universitato. Kvankam IISG mem volas havi ĉiujn arkivojn, la asocio kiel Esperanto Nederland tamen devas pagi. IISG agas en stranga maniero: fakturo ne estas, sed EN faru donacion.

Andries anoncis, ke li ne ĉeestos la sekvan kunvenon. Li ofte partoprenas Esperanto-aranĝojn ĉie en Eŭropo. Post du semajnoj denove okazos eksterlanda Esperanto-kunveno, kiun li volonte partoprenos.

17 novembro

Luit kunportis kelkajn Esperanto-librojn por fordoni. Sed ĉeestis ne Andries! Ĉi-foje Richard portis plurajn librojn hejmen. Ineke faris foton pri la libroj kaj sendis ĝin al Andries per *Whatsapp*. Andries estis survoje al Esperanto-renkontiĝo en Slovakio. Li tuj reagis al la mesaĝo. Li vojaĝis dum 24 horoj por ĉeesti KAEST-n. Li bedaŭras, ke la librojn li ne povis preni.

Andries fariĝis vojaĝema membro de nia klubo. Tio plaĉas al Ineke, ĉar ankaŭ ŝi ŝatas vojaĝi.

Luit montris la koverton, kiun li ricevis de Esperanto Nederland. Estas la voĉdonilo por nova statuto de UEA. Ĉiuj membroj de Esperanto Nederland, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA, ricevas tiujn paperojn, por ke la estraro de Esperanto Nederland transdonu poste la rezulton al UEA.

Johan ricevis la peton de la studenta organizo *AEGEE* prelegi pri Esperanto. Wil

kaj Ineke iros tien. Ineke preparas prelegon pri ĝeneralaj temoj (ekesto, Zamenhof, praktikaj kialoj) kaj Wil donos provlecionon al la studentoj.

Wil retrovis plurajn paperetojn pri proverboj: *al la papero ne mankas tolero; eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj*.

Wil montris ankaŭ aliajn kartojn: kun demandoj kaj respondoj. Lu prenas la demandokarton, alia prenas la respondokarton.



Simila ludo estas Advertentiespel

Ekzemplo de demando: *ĉu vi ebriiĝemas?* La respondokarto tekstas: *ĉiam lunde matene*. La kunmetado de demandoj kaj respondoj havas plurfoje amuzan efikon.

15 decembro, Zamenhofa vespero

Naŭ personoj venis al la Zamenhofa vespero, sur la foto videblas ne Andries, ĉar li faris la foton. Ĉiu kunportis ion por trinki aŭ manĝi. La unua manĝmeto estis kiel ĉiam la supo preparita de Luit. Kiel kutime Nelly mem kuiris. Ŝi preparis bongustan spinackukon. Richard kunportis sian intertempe famkonatan mempremitan pomsukon. Ineke ĵus revenis el Tenerifo, hispana insulo, ŝi do kunportis hispanan manĝaĵon. La lasta manĝmeto estas ankaŭ tradicio: glaciaĵo;

por Johan la prefera parto de tagmanĝo ja estas la deserto.



5 januaro 2017

En la tago antaŭ la kunveno de la 5-a de januaro, Wil festis sian 88-an naskiĝdatrevenon. Dum la klubkunveno ŝi regalis nin per krakenoj. Ŝi eksplikis kial ŝi kunportis krakenojn:



= 88

metu du krakenojn tiel ke ili staras unu apud la alia. Vi bezonas nur malmultan fantazion por vidi ŝian aĝon: duoble ok estas 88.

Nelly fiere aŭdigis al ni la jubilean kanton de *Efteling*. Estis bela kanto, kaj la muzikvideo montris malnovajn bildojn de Efteling, sed kio estas la rilato al nia klubo? Fine de la kanto Nelly eksplikis: la kantistino estas ŝia filino.


Wil ŝatus esti interpretisto-tradukisto. Sed kiel malfacile vere estas samtempa tradukado? Ŝi ne scias, do ni klopodis, ĉu ni kapablas traduki rakonton, preskaŭ

same rapide ol Wil ĝin voĉlegas. Tute ne: kiam la voĉleganto estis je la fino de la frazo, ni jam forgesis la komencon. Tre malfacila profesio.

19 januaro

La pasintajn semajnojn Ineke jam okupiĝis pri la venonta studosemajnfino, kiu okazos en Stevensbeek, Noord-Brabant, de la 3-a ĝis inkluzive la 5-a de marto 2017. Anoncis sin jam 32 partoprenontoj. Restas nur 7 liberaj lokoj. Dum la kunveno anoncis sin partoprenonto numero 33: Andries. Inter la aliĝintoj estas ok personoj, kiuj partoprenos studosemajnfino unuafoje. Inter ili estas kvar fratinoj kun amikino kaj 14-jara knabino.

Ineke kunportis kelkajn malnovajn gazetartikolojn, kiujn ŝi kopiis de la retpaĝaro de *Delpher* (www.delpher.nl).



Artikolo de majo 1973 temas pri la transdono de kelkaj libroj al la biblioteko de Groningen. Per Delpher eblas rigardi pli ol 60 milionojn da paĝoj de nederlandaj gazetoj, libroj kaj revuoj.

Ineke kunportis fotolibron pri sia feriado sur la insulo Tenerifo. Ŝi montris ankaŭ

ABC-libron kun bildoj, kiuj rilatas la katalunan arkitekton *Antonio Gaudí* (1852-1926). La plej konata verko de Gaudí estas la Templo Sankta Familio (la Sagrada Familia) en Barcelono, kiu pli ol 90 jaroj post lia morto ankoraŭ ne estas finkonstruita.



Wil,

Ineke kaj Andries vizitis s-inon Greta Volders en Finsterwolde. Ŝi estas membro de la klubo kaj vizitadas la kurson de Wil. Ili kune vizitis i.a. la konatan regionon *Blauwe Stad* kaj la *Kiekkaaste* en *Nieuwe Statenzijl*. La *Kiekkaaste* estas la ununura eksterdiga bird-observejo. Vizitantoj de la *Kiekkaaste* povas bone observi la birdojn sur la kotkampoj de la Dollard. En la ĉirkaŭaĵo de Finsterwolde troviĝas i.a. ankaŭ la vilaĝetoj *Ganzendijk* kaj *Hongerige Wolf*.

Luit denove kunportis kelkajn E-librojn por fordoni.

2 februaro

Fine de la pasinta jaro mortis *Albert Hoekstra*. Por la nekrologo ni havis malgrandan malnovan foton. Ni cerbumis pri la dato kaj loko de la foto. Ŝajne la foto estis farita dum Zamenhofa tago en Bremeno. Sed eĉ la aliaj personoj sur la foto ne plu rememoris la kunvenon. Albert kreis la Frisan-Esperantan vortaron. Do eble por Fenikso foto de kelkaj lemoj estos bona ideo. Kelkaj lemoj rilate al Frislando kaj la frisa lingvo estas apud unu la alia en la vortaro. Andries fotis tiun sektion de la vortaro kaj sendis ĝin al la redaktoro de Fenikso.

Ni denove parolis pri la kurssemajnfino komence de marto. La 2-an de februaro restis nur unu libera loko. Venas inter aliaj 13 novuloj, kelkaj personoj, kiuj aŭdis pri la kurssemajnfino nur, ĉar ili rilatas al la kunvenejo, kaj Chris el Nijmegen. Kutime li estas tro malfrue por aliĝi, sed ĉi-foje Andries instigis lin ne prokrasti. Se vi volas legi pli pri Chris, iru al lia retejo *puzzled.nl*, kie li mem eksplikas kiu li estas, kaj kial matematiko estas interesa eĉ por junaj infanoj.

Por la kurssemajnfino Ineke daŭre solvas enigmojn: kiu dormos en la sama salono kune kun kiu? Kaj kiam ŝi havas solvon, tuj aliĝas geedza paro, kiu kompreneble povas dormi kune en unu el la malmultaj du-personaj ĉambroj. Aŭ kiam restas nur la supra el stakataj litoj aliĝas maljunulo, kiu ne plu povas grimpi. Sed finfine estas lito por ĉiuj.

Luit ankoraŭ ordigas sian domon. Ĉi-foje li kunportis tabulon kun la teksto *esperanto parolata*, multajn kovertojn el 1988 kun la emblemo de la 73-a UK en Roterdamo, kaj eĉ afiŝojn de tiu UK. Denove estas personoj, kiuj volonte pretas kunporti la objektojn hejmen.

En Eindhovens Dagblad estas artikolo pri *Frank*, la mezlernejo el Someren, kiu lernas Esperanton helpe de Wil. La artikolo mencias eĉ Wil kiel mentoro.

Ineke havas memortabulon pri sia avo, kiu iel kaŭzis, ke ŝi lernis Esperanton. La memortabulo havas ateston pri la Esperanto-scio de la avo, kun la subskribo de *Hendrik Bulthuis*. La Esperanta retpaĝo en Wikipedio pri Bulthuis montras bildon de lia subskribo. Andries komparis ambaŭ, kaj konkludis, ke vere Hendrik J. Bulthuis subskribis la ateston de la avo de Ineke.

16 februaro

La kunveno de la 16-a de februaro okazis nur du semajnojn antaŭ la printempa kurssemajnfino de Esperanto Nederland. Nun estas la periodo de malaliĝoj. Aliĝis 16 novaj personoj, kiuj ankoraŭ ne estis konataj en Esperantujo. Inter ili estas 14-jara knabino. Sed kiel eltrovi, ĉu la gepatroj aprobas? Feliĉe la patrino veturigos la knabinon al la kursejo, kaj Ineke sciigis, ke ŝi volonte konatiĝos kun la patrino. Problemo solvita!

Andries kolektas esperantaĵojn. La librokolekto jam estas tiel vasta, ke li havas en la libro-ŝranko da libroj du aŭ eĉ tri vicoj (unu malantaŭ la alia). Tiel li ne plu povas eviti, ke li aĉetas de la libroj duoblaĵojn.

Dume Luit malkolektas. Ankaŭ ĉi-tage li kunportis esperantaĵojn, kiujn li ne plu bezonas, interalie glumarkojn, matĉo-skatolojn, la famajn glumarkojn *atomenergio*, *ne dankon* kaj bildkartojn *bela Nederlando*, iam eldonitajn de la libroservo de FLE. "Interesaj objektoj", ni diris, "jes", respondis Luit, "sed ili senutile

kuŝas en miaj ŝrankoj."

Iam la Groningen-a turista agentejo VVV eldonis faldfolion pri Groningen: *Vidindaĵoj en urbo kaj provinco*. Ankaŭ de fremdul-trafikagentejo la telefonnumero estis 5-cifera, kiel ĉiuj aliaj Groningen-aj numeroj. RKZ ankoraŭ situis je *Verlengde Hereweg*, kaj *Diaconessenhuis* situas je *Praediniussingel*. La aŭtobusfirmaoj por iri al la provinco havis nomojn kiel *GADO*, *DAM*, kaj *ESA*. Tio estas pura ĝuo, ĉu ne?

En Usono ili havas novan prezidenton, kiu diras: *America first*. La televida programo *Zondag Met Lubach* kreis parodion: *the Netherlands second*, en Interreto spektebla je <http://youtu.be/ELD2AwFN9Nc>. Post tio ankaŭ multaj landoj, provincoj kaj eĉ urboj kreis similan parodion. Sed nun serĉu per Google: *esperanto second parody*, kaj vi trovos *America first*, *Esperantujo Second!* Je <http://youtu.be/FH1oVj1O5xw>. La lastajn kvin minutojn de la kunveno ni spektis tiun filmon. "Ankaŭ ni havas oficialan urbon (Herzberg-am-Harz), sed parolas ne la lingvon la plimulto de ĝia loĝantaro".

AFZENDER / SENDINTO:

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC GRONINGEN

ESPERANTO taal zonder grenzen

